APERAS MONATE


# Verda Voĉo de Doksy

REDAKTORO ANT. SLANINA
AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO-LERNEJO

20.VII.1948 Číslo 2.

## N i a t r i a s o m e r k u r s o

Unuo ion pri historio. Pasintaj du kursoj montriĝistre efikaj. Nuna bonego komencas. Pluvo, pluvo, pluvo . . . Malgraŭ tio venis ĉijare 200 homoj, de infanoj ĝis matur-aĝaj / ĉar Esperanto, laŭ la vortoj de d-ro Pitlík juniĝas, oni ne povas paroli pri maljunuloj. / La solena kunveno okazis en la malnova kastolo kie oni amasiĝis en du ĉambroj. Ĉio plenplena, ĉie zumas nacia kaj internacia lingvoj. Poste aŭdiĝas la solenaj paroloj de la ĉefaj agantoj. D-ro Pitlík, s-roj Slanina, Šolc, Špůr, kaj kiel sur ekrano aperas kelkaj eminentuloj: s-ro Píč, nia poezo, niaj kantistoj kaj geaktoroj el Praha, s-ro Vítek, nia plej juna vojaĝanto.



La sonoj de la himno esperantista kortuŝe plenigas la solenan atmosferon. Sed baldaŭ la korpremo malaperas post afablaj vortoj de la gvidantoj, kaj post nelongaj montra kanto kaj interkonsento pri plua programo, oni dancas, kaj reciproke laŭeble interkonatiĝas.

Dimanĉe, je la 9.30 okazis solena akcepto ĉe la urbestro, de kie oni disaŭdigis la parolojn en la tutan urbon.

Kelkaj el ni aŭdie publikan parolon kaj himnon unuafoje, kaj ne mirinde, ke eĉ larmoj de emocio aperis en kelkaj okuloj . . . Poste s-ano Pech – fama vojaĝinto bonege fermis en la kino Máj la solenajn kaj esperigajn momentojn por la plua laboro, per sia interesa prelego.

Ni forte esperas, ke ankaŭ ĉi-jare, same kiel dum la du estintaj Somer-kursoj, la gesamideano, bone uzos sian tempon.

Vivu nia tria Esperanto-lernejo en Doksy, ĝi bone prosperu kaj alportu al ni multajn novajn fervorulojn kaj batalantojn por la fina venko de nia majesta Zamenhofa ideo!

-Joĉo-

VERDKORULO SKRIBAS . . .

Hieraŭ matene ekvivis la urboplaco en Doksy per dekoj da verdstelanoj portantaj tipan kajeron aŭ notlibreton, indikantan partoprenanto de la somera Esperanto-kurso.

Kaj la malnova lernejo ŝajnis iom surprizita, estinte vekita el sia dumonata kvieto, kaj ĝi bonvenigis la vizitantijn per evidenta malkonfido: "Kiuj estas la grandaj homoj? Mi ja alkutimiĝis al malgrandaj buboj kaj knabinetoj!"

Sed baldaŭ la kara lernejo ekkonis, ke tiuj ĉi plenkreskaj lernantoj efektive per nenio distingiĝas de la ĉarmaj infanetoj, vizitantaj ĝin dum plenaj dek monatoj. Ili ja ankaŭ eniradis ĝin aŭ mallaŭte interparolante – estis novuloj -, aŭ bruridante, per kio oni vidigis, ke ili estas jam spertaj Esperanto-kozakoj. Sed kiam oni komencis instrui en la klasoj, tuj akordiĝis la ambaŭ grupoj tiamaniere, ke ili konkorde kaptadis el aero la eufloratajn vortetojn, aŭ eĉ transskribis la taskon – kio ja estas salpermesate – konkorde silentis, aŭ male brilis per sprito kaj scio ŝparitaj dum pasinta jaro.- Jes, tiuj estis jam la spertuloj!

Sed kion devis fari la timigitaj etuloj en kurso fundamenta? Kredu, amikoj, mi preskaŭ beraŭris ilin! Ĉar sur iliaj vizaĝoj oni povis legi mutan riproĉon de homoj suferontaj . . . Vere, tiuj plenkreskaj lernantoj diferenciĝis de la malgrandaj nur per tio, ke ilin ne alkondukis zorgema panjo. Kelkaj ja marŝis energie, kaj kuraĝe, sed iliaj paŝoj malrapidiĝis ju pli, des pli proksimiĝadis la lernejo. Ne tute certaj informoj eĉ diras, ke kelkaj lernantoj voli eniri la lernejon nur sub unu kondiĉo, neomi ke ili ricevos de siaj instruistoj leksukeraĵon kaj unuon por konduto. Pli poste oni sukcesis deturni ilin de tiu freneza propono. / leksukeraĵo ja oni jam dum kvin jaroj ne fabrikas! /, kaj la menciitaj do tamen eksidis kaj per siaj obstinaj larmetoj penis lavila polve kovritajn benkojn. Sed dum la instruado iliaj vizaĵoj ĉiam pli heliĝis kaj fine ili ekkoni ke ĝi efektive estas eĉ ne iom malfacila, kaj fervore leviĝante, korespondadis demandojn de sinjoroj instruistoj.

Kaj kiam ili je duono post la dekdua eliris kun la aliaj por tagmanĝi – nu, tio jam estis veraj esperantistoj, ĉar ili travivis sian unuan Esperanto-bapton! Ili ja enhavis la unuan lecionon de Esperanto!

Kaj mi deziras al vi ĉiuj, niaj esperantistaj, novicoj, ke vi ankoraŭ multage da ili kun sukceso absolvu!

-NoMo-

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Karolo Píč. A l m a r a j v o j o j

Ankoraŭ ĉiam mi vi rememoras;
sed tiu rememoro min ne plu boras:

ĉar, se ekzemple iu al la maro
vojaĝos, li el sia vagonaro

ankaŭ diversajn belajn aĵojn vidas,
kaj tamen li pro ili sin ne bridas;

sed malgraŭ ĉio, kion li vid-tuŝas
li plu sin pelas tien, kie kuŝas

la nekonata, malproksima maro
kun siaj ondoj, uraganoj, salo . . .

Sufiĉe, se pri apudvoja floro
restas en li almenaŭ rememoro . . .

ooooooo
ooooo
ooo
o

NOVAĴOJ

Dnešní dopolední program:

Za slunečního počasí koupání v jezeře, a bude-li jen příznivé počasí, řečnická lekce v přírodním divadle, v Masarykových sadech. Sraz tamtéž ve 14 hodin. Vede s-ano Slanina.

Výlet do Starých Splavů sraz ve 14 hodin u Jelena, vede s-ano Jestřáb.

Kdo chce spatřit Bezděz, ať se přihlásí u s-anino "Markizino" ve 14 hodin u měšťanské školy.

Dnes večer. V rámci III. Máchova festivalu sehraje divadelní soubor z Bělé pod Bezdězem hru nár. umělce Fr.Langra "Obrácení Ferdyše Pištory".

KLAĈEMA OBSERVANTO

Hanako havas ĉie amikojn, eĉ sen Esp—o. -Tion pruvis bonege s-ano -Hanakoper sia oratora parolo. "Mi estas Hanako kaj mi sategas buchtojn, kukojn, precipe hanakajn. Kaj ĉar estas jam dekaua, mi ege malsatas kaj ĉiu samideanino aŭ s-ano, kiu posedas buchtojn aŭ kukojn, estas mia amiko." Joĉo

Kiam ĉesos pluvi? Demandas multaj adeptoj de l´verde ideo, ĉar dio nunjara multe vendiĝas. Pri tio bonan klarigon donas s-ano Slanina2 "Enute ne ĉesos pluvi. Estos kaj regos duonpluvo. Ĉi tiu nova termino signfas, ke antaŭtagmeze pluvos, por ke la kursoj bone prosperu, kaj posttagmezoj estos rezervataj por la "suno" kaj aliaj amuzaj entreprenoj.

Joĉo

EPITAFO KONTRAŬ SLANINA

Je komenca rigardo kaptis min granda ardo; sed estis nur unu kardo, kun efiko de ponardo: Nome sinjoro Lardo Joĉo

SENTENCOJ

Vědění a moc člověka je totéž, protože neznalost věcí maří úspěch.

- o -

Vrtkavost je nejvýznačnější rys slabé povahy.
Voltaire

- o -

Kdo sedí na vrbě je blázen, nevyřeže-li si píšťalu. Bramínská moudrost

- o -

Jediná životní moudrost je lepší, než musit se spoléhet na cizí moudrost.

ANONCOJ

Sinjoro, kiu ĉe-okazede interkonatiĝa vespero perdis sian koron, bonvolu anonci sin ĉe pordisto.

"Vana peno"

El fruktoj de viaj scioj mi faros specialan kompoton. "Konservo de viaj kapoj"

U P O Z O R N Ě N Í ! ! !

Samideáni, kteří mají zájem spolupracovati při našich zábavních podnicích, ať už organizačně nebo herecky, nechť se laskavě ihned přihlásí u s-ana Miloše Nývlta, kurs C; v přestávkách mezi vyučováním. Jedná se v prvé řadě o uspořádání kabaretu, později pak esperantské akademie a táborovéh ohně. Je též nutná spolupráce při pořádání letního karnevalu. Kdo ovládá hudební nástroje, nechť se hlásí u s-ana dr. Vaňka.

---

ŜERCOJ DE SAMIDEANINO RAŠKOVÁ

C E N Z U R I T A

C E N Z U R I T

A